



## FLAMO por sudazia movada sparkigo

Teksto el EKO 28 sendita el Bengaluru en la 13a de oktobro 2017

Antaŭ horo venis al fino la unuhora sesio de FLAM-analizo, kiun partoprenis 38 seminarianoj – samtempe anoj de la 4a SAS kaj la 39a AMO. Post klarigoj pri la analiza metodo, ili en kvar grupoj diskutis la Fortojn kaj Lamaĵojn (malfortojn) de la movado en Sud-Azio, kaj precipe en Barato. Sekvis la Avantaĝoj kaj Minacoj de la socioj de la regiono, kiuj vole-nevole efikas sur la laboroj de la esperantistoj.

Jen la rezultoj, kiuj gvidos nin al sesio dimanĉe en kiu ni serĉos direktojn kaj projektojn por reagi al nia analizo:

### NUNAJ FORTOJ

- Oficejo en Nepalo
- Multjara praktiko eluzi turismon, plejparte en Nepalo
- Universitata grupo kaj kursoj en la Universitato Azim Premji en Bengaluru
- Unuopaj kapablaj aktivuloj diversurbe en Barato.

### POTENCIALAJ FORTOJ

- Granda celpopolo, kun multegaj junuloj.
- Moderna teknologio malfermas multajn eblojn.
- La allogo vojaĝi per Esperanto.
- Ebloj renkontiĝi translime.
- Interkulturaj projektoj kaj agado.
- Gastemo, interalie pere de la Pasporta Servo.



Foto: smg

### MALFORTOJ

- Konkurencaj okupoj aŭ studodevoj; limigita tempo.
- Nesufiĉa komunikado de utilaj informoj.
- Malfacileco konvinki homojn pri la valoroj de Esperanto.
- Nealta lingva nivelo pro neofta uzado, precipe internacie.

### AVANTAĜOJ

- Sociaj malfermiĝoj kaj evoluoj tra la regiono.
- Natura helpemo kaj bonvolo en la publikoj de la regiono.
- Multlingva regiono spertigas komunikajn problemojn.
- Ebloj eluzi pere de Esperanto medicinan turismon.

### MINACOJ

- Grandaj distancoj en Barato, monĉenoj nordlime.
- Financaj baroj, limigita pagipovo.
- Malpaco inter la landoj.
- Prestiĝo de la angla.
- Neemo akcepti oficialigon de E-instruado.

Bengaluro, la 13a de oktobro 2017 EKO 28 FLAM-analizo